

Takaho (*Notornis mantelli*)
(Nov-Zelando)



Esperanto sub la Suda Kruco

Januaro-Februaro 1999
Numero 37 (vol. 7, n° 1)



ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Numero 37 (volumo 7, numero 1), Januaro-Februaro 1999
Redaktoro: Donald Broadribb
PO Box 643, York WA 6302, Aŭstralio
e-poŝto: <esk@poboxes.com>

Libroservo:

Tom Elliott, PO Box 230,
Matraville NSW 2036, Aŭstralio.
e-poŝto:

<tmelt@nextcentury.com.au>

Librokatalogo:

<[http://www.nextcentury.com.au/
~tmelt/](http://www.nextcentury.com.au/~tmelt/)>

Korespondaj kursoj:

Hazel Green, 44 Towoomba Road,
Oakey Qld 4401. e-poŝto:
<hazgreen@tmba.design.net.au>

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO, VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakonton, esprimon de vidpunkto, leteron, desegnaĵon, foton. Vi povas sendi vian kontribuon per e-poŝto, sur komputila disko (Mac aŭ MS-DOS—nur 3.5"), aŭ sur papero. Se vi sendas sur papero, la teksto devas esti klare tajpita per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flankon de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto ĉiun tekston antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti

mallongigita. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro.

EN ĈI TIU NUMERO

Artikoloj:

Gemo Literatura (Donald Broadribb)	3
Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj	5
Reĝino (Paserĉjo)	10
En Edinburga Kajefo (Jennifer Bishop)	13
Laŭ la Interreto	17
Plura raporto el Litovio (Trevor Steele)	18
Skribas la legantoj	19
Deziras korespondi	23
Lingva angulo (Donald Broadribb)	23
Infandeseĝnaĵoj kiel interkultura ligilo (Katalin Smidéliusza)	25
El la regionoj	26

Recenzoj:

<i>Durankulak</i> (D.B.)	3
<i>Esperanto post la jaro 2000</i> (D.B.)	15
<i>Kontribuoj al PIV</i> (D.B.)	16
<i>La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto</i> (D.B.) ..	16
<i>Terminologia Guidilo</i> (D.B.)	17

ENGLISH SUPPLEMENT

Limdato por artikoloj por la marta numero: 15 januaro.

ESK estas legebla per la Internet:
<http://www.poboxes.com/esk>

GEMO LITERATURA

Sabira Ståhlberg: *Durankulak*.
Varna (Bulgario): Bambu, 1998.
79p. broŝ. — Recenzas Donald
Broadribb.

Nur malofte aperas spektakle altkvalita literaturaĵo originala en Esperanto. Kvankam literaturo abundas en Esperanto, plejparte la kvalito de la originalaj verkoj estas tre malalta; ĝenerale ili estas ĉiurilate amatoraj kaj mallertaj. Esceptoj estas malmultaj: en la proza fako elstaras la romano de nia propra Aŭstralia Esperantista aŭtoro Trevor Steele, *Sed nur fragmento*. Iom surprize, ankaŭ legantoj de altkvalita prozo malmultas inter la Esperantistoj.

Laŭ la ĉiujaraj “furor-listoj” de verkoj venditaj de la Libroservo de U.E.A., nur kelkcent ekzempleroj de literaturaj verkoj ensume ĉiujare vendiĝas. Do eble ne mirigas ke tiel malofte profesikvalitaj verkistoj aperigas originalajn romanojn kaj novelojn en nia lingvo.

Sed ĉi tiu nelonga romano, *Durankulak*, estas miriga escepto. Se vi ĝuas legi altkvalitan prozon tamen perdos la oportunon aĉeti kaj legi ĝin, vin preterpasos unika literaturaĵo originala nia.

La etulo tuj antaŭ mi jam premas sian nazon kontraŭ la vitro de la kaso. Aha. Evidente eksterlandano. Kion li volas ankoraŭ, nun? Je tiu ĉi sezono la turistoj

jam estas for. Nenio plu restas en la regiono por sperti. Nur pluvaĉas.

Kaj ĉiukaze, krom la belaj plaĝoj estas ne multo vidinda ĉi tie.

Li volas per buso veturi ien.

Kien?

Mi ne povas imagi, ke mi ĝuste aŭdis.

Durankulak. Durankulak?

Li turnas sin, ricevinte biletan. Okulvitroj pendas, falontaj, sur la nazpinto. Nigra hararo strebas en ĉiujn direktojn. La dorsosak-ego svingiĝas sur lia dorso.

Aha, japano. Interesas. Li aĉetas biletan al Durankulak.

Durankulak estas fantazieca vilaĝo, situanta ĉe la ekstremo de lando nenomita, tuj inter la agroj kaj la senhoma sovaĝa stepo kie ŝajne abundas nur lupoj, kaj kiu estas ankaŭ la loĝejo de la Besto.

Unufoje jare haltas buso en Durankulak. Kutime ne pli. Nur iam antaŭ trideko da jaroj venis inspektoro de la ŝtata sanadministracio, kaj tiam haltis la buso duan fojon ĉe Durankulak. Pri tio oni parolis longe en la urbo. Eĉ nuntempe okazas, ke iu mencias la aferon, tiom ekster-

ordinara ĝi estis...

En la printempo ĉi-jare jam haltis la buso unu fojon ĉe Durankulak.

La tuta urbo venis por spekti... Se ne estas vojaĝantoj ĝis ĉi tie, la buso revenas pli frue, kvankam la reguloj postulas, ke ĝi veturu ĝis la fino. Sed la ŝoforo timas la stepon, kien li devas veturi por turni la buson: la vojo tro mallarĝas ĉe Durankulak. Feliĉe por li neniu scias, neniu kontrolas; ne ĉi tie.

Kiu mistero do sin kaŝas en Durankulak? Nu, nur ke ĝi estas ia Brigadon, vilaĝo preskaŭ tutaparta de la cetera mondo, vilaĝo en kiu okazas tute ne anticipeblaj eventoj, vilaĝo en kiu la homoj estas...nu, ne elstare bonvolaj nek afablaj nek helpemaj, sed kies moroj postulas amikecajn agojn neatenditajn. Ekzemple, ke hotelgasto (maloftega evento!) ja estas gasto, do oni ne rajtas peti aŭ eĉ akcepti pagon! Vilaĝo en kiu ne nur la homa lingvo sed evidente ankaŭ tiu de la hundoj estas parenca al fora, fremda lingvo kiun indas priesplori kaj kies parencecon indas studi.

Kaj en Durankulak oni tradormas la vintron, samkiel sciuroj, tial la eksterlandano devas forlasi la vilaĝon por tiu periodo.

Nia Japana "turisto", tamen ne estas ordinara turisto, malgraŭ la fotilo pendanta de lia kolo kaj la frazlibro Japan-nacilingva kiun li konsultas konstante por sin duon-


komprenigi. Li estas sciencisto, kiu serĉas fotti tre unikan birdon, kiu ekzistas nur en (aŭ eble apud) Durankulak, kaj pri kies ekzisto tre dubas la specialistoj alilandaj.

Efektive ni trovas ke tiu unika birdo ja ekzistas, kvankam ĝia naturo estas ankaŭ eksterordinare unika, kaj la misio de nia Japana sciencisto nur parte plenumiĝas.

Ĉu komika romaneto, kiel supozigas kelkaj recenzintoj? Nu, ĝi ja havas sian komikan trajtaron, kaj verŝajne estus multe tro aŭdace flustri ke eble ĝi havas kaŝitan signifon.

Ĝi estas leĝera legaĵo, lingve bonega (ne tre ofta afero en nia literaturaĵaro originala!), stile tre plaĉa, bone presita (ankaŭ ne oftega evento Esperantista), modeste sed firme broŝurita...

Entute, se vin maltrafos ĉi tiu verko, al vi mankos tre ĝuplena literatura sperto. □



Teksto de afiŝo en restoracio en Acapulco, en Meksiko:

Many clients worry about quality of our water. Not to worry. All our water has been passed by our headwaiter.

[El Esperanto USA]

UNIVERSALA DEKLARACIO DE HOMAJ RAJTOJ

HONORE AL LA 50A DATREVENO DE LA DEKLARACIO

La 10-an de decembro 1948 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj akceptis kaj proklamis la Universalan Deklaracion de Homaj Rajtoj, kies plena teksto troviĝas sur la sekvaj paĝoj. Post tiu historia ago la Asembleo alvokis ĉiujn Ŝtatojn-Membrojn publikigi la tekston de la Deklaracio kaj "fari, ke oni ĝin disvastigu, afiŝigu, legu kaj komentu, ĉefe en lernejoj kaj aliaj institutoj de instruado, sen distingo bazita sur la politika stato de landoj aŭ teritorioj."

Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj

Adoptita kaj proklamita de
Rezolucio 217 A (III) de la Ĝenerala Asembleo, 10 decembro 1948

Antaŭkonsideroj

Pro tio, ke agnosko de la esenca digno kaj de la egalaj kaj nefordoneblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homara familio estas la fundamento de libero, justo kaj paco en la mondo,

Pro tio, ke malagnosko kaj malestimo de la homaj rajtoj rezultigis barbarajn agojn, kiuj forte ofendis la konsciencon de la homaro, kaj ke la efektiviĝo de tia mondo, en kiu la homoj ĝuos liberecon de parolo kaj de kredo kaj liberiĝon el timo kaj bezono, estas proklamita kiel la plej alta aspiro de ordinaraj homoj,

Pro tio, ke nepre necesas, se la homoj ne estu devigitaj, sen alia elektebla vojo, ribeli kontraŭ tiranismo kaj subpremo, ke la homaj rajtoj estu protektataj de la leĝo,

Pro tio, ke nepre necesas evoluigi amikajn rilatojn inter la nacioj,

Pro tio, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj en la Ĉarto reasertis sian firman kredon je la fundamentaj homaj rajtoj, je la digno kaj valoro de la homa personeco kaj je la egalaj rajtoj de viroj kaj virinoj, kaj firme decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altnivelan vivon en pli granda libereco,

Pro tio, ke la Ŝtatoj-Membroj sin devigis atingi, en kunlaboro kun Unuiĝintaj Nacioj, la antaŭenigon de universala respekto al kaj observado de la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj,

Pro tio, ke komuna kompreno pri tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas esence grava por plena realigo de tiu sindevigo,

Tial, nun,

La Ĝenerala Asembleo,

Proklamas tiun ĉi Universalan Dek-

laracion de Homaj Rajtoj kiel komunan celon de atingo por ĉiuj popoloj kaj ĉiuj nacioj, por tio, ke ĉiu individuo kaj ĉiu organo de la socio, konstante atentante ĉi tiun Deklaracion, per instruado kaj edukado strebu al respektigo de tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj, kaj per laŭgradaj paŝoj naciaj kaj internaciaj certigu ilian universalan kaj efektivan agnoskon kaj observadon, same tiel inter la popoloj de la Ŝtatoj-Membroj mem, kiel inter la popoloj de teritorioj sub ilia jurisdikcio.

Artikolo 1

Ĉiuj homoj estas denaske liberaj kaj egalaj laŭ digno kaj rajtoj. Ili posedas racion kaj konsciencon, kaj devus konduki unu al alia en spirito de frateco.

Artikolo 2

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu ĉi Deklaracio validas same por ĉiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, ĉu laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato.

Plie, nenia diferencigo estu farata surbaze de la politika, jurisdikcia aŭ internacia pozicio de la lando aŭ teritorio, al kiu apartenas la koncerna persono, senkonsidere ĉu ĝi estas sendependa, sub kuratoreco, nesinreganta aŭ sub kia ajn alia limigo de la suvereneco.

Artikolo 3

Ĉiu havas la rajtojn je vivo, libereco kaj persona sekureco.

Artikolo 4

Neniu estu tenata en sklaveco aŭ servuteco; sklaveco kaj sklavkomerco estu malpermesitaj en ĉiuj siaj formoj.

Artikolo 5

Neniu suferu torturon aŭ kruelan, nehoman aŭ sendignigan traktadon aŭ punon.

Artikolo 6

Ĉiu rajtas esti ĉie agnoskita jure kiel persono.

Artikolo 7

Ĉiuj homoj estas jure egalaj, kaj rajtas sen diskriminacio al egala jura protekto. Ĉiuj rajtas ricevi egalan protekton kontraŭ kia ajn diskriminacio, kiu kontraŭas tiun ĉi Deklaracion, kaj kontraŭ kia ajn instigo al tia diskriminacio.

Artikolo 8

Ĉiu rajtas ricevi de la kompetentaj naciaj tribunaloj efikan riparon pro agoj, kiuj kontraŭas la fundamentajn rajtojn, kiujn li havas laŭ la konstitucio aŭ la leĝoj.

Artikolo 9

Neniu suferu arbitrajn areston, mal-liberigon aŭ ekzilon.

Artikolo 10

Ĉiu en plena egaleco rajtas je justa kaj publika proceso antaŭ sendependa kaj senpartia tribunalo, por prijuĝo de liaj rajtoj kaj devoj kaj de kiu ajn kriminala akuzo kontraŭ li.

Artikolo 11

Ĉiu akuzita pro punebla faro rajtas, ke oni supozu lin senkulpa, ĝis oni pruvos laŭleĝe lian kulpon en publika proceso, en kiu li ricevis ĉiujn garantiojn necesajn por sia defendo.

Neniu estu konsiderata krimkulpa pro kia ajn ago aŭ neago, kiu ne konsistigis puneblan faron, laŭ nacia aŭ internacia juro, en la tempo, kiam ĝi estis farita. Same tiel, ne estu aljuĝita pli severa puno ol tiu, kiu estis aplikebla en la tempo, kiam la punebla faro estis plenumita.

Artikolo 12

Neniu suferu arbitrajn intervenojn en sian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondadon, nek atakojn kontraŭ sia honoro aŭ reputacio. Ĉiu rajtas ricevi juran protekton kontraŭ tiaj intervenoj aŭ atakoj.

Artikolo 13

Ĉiu havas la rajton libere moviĝi kaj loĝi interne de la limoj de kiu ajn Ŝtato.

Ĉiu rajtas eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj reveni en sian landon.

Artikolo 14

Ĉiu rajtas peti kaj ricevi en aliaj landoj azilon kontraŭ persekuto.

Tiu rajto ne estas alvokebla en kazoj de persekutaj akuzoj malfalse levitaj pro ne-politikaj krimoj aŭ pro agoj kontraŭaj al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 15

Ĉiu rajtas havi ŝtatanecon.

Al neniu estu arbitre forprenita la ŝtataneco, nek rifuzita la rajto ŝanĝi sian ŝtatanecon.

Artikolo 16

Plenaĝaj viroj kaj virinoj, sen ia ajn limigo pro raso, nacieco aŭ religio, rajtas edziĝi kaj fondi familion. Iliaj rajtoj estas egalaj koncerne la geedziĝon, dum la geedzeco kaj koncerne eksedziĝon.

Geedziĝo okazu sole laŭ libera kaj plena konsento de la geedziĝontoj.

La familio estas la natura kaj fundamenta grupunuco de la socio, kaj ĝi rajtas ricevi protekton de la socio kaj de la Ŝtato.

Artikolo 17

Ĉiu rajtas proprieti havaĵon, kaj sola kaj en asociiĝo kun aliaj.

Al neniu estu arbitre forprenita lia proprieto.

Artikolo 18

Ĉiu havas la rajton je libereco de

penso, konscienco kaj religio; tiu ĉi rajto inkluzivas la liberecon ŝanĝi sian religion aŭ kredon, kaj liberecon manifesti, ĉu sola ĉu kune kun aliaj, ĉu publike ĉu private, sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado.

Artikolo 19

Ĉiu havas la rajton je libereco de opinio kaj esprimado; ĉi tiu rajto inkluzivas la liberecon havi opiniojn sen intervenoj de aliaj, kaj la rajton peti, ricevi kaj havigi informojn kaj ideojn per kiu ajn rimedo kaj senkonsidere pri la landlimoj.

Artikolo 20

Ĉiu havas la rajton je libereco de pacema kunvenado kaj asociiĝo. Neniu estu devigita aparteni al asocio.

Artikolo 21

Ĉiu homo rajtas partopreni la regadon de sia lando, aŭ rekte aŭ pere de libere elektitaj reprezentantoj.

Ĉiu rajtas je egala aliro al publika servo en sia lando.

La volo de la popolo estu la bazo de la aŭtoritato de la registaro; tiu volo estu esprimata per regulaj kaj aŭtentikaj elektoj, kiuj okazu per universala kaj egala balotrajto, kaj per sekreta voĉdono aŭ ekvivalentaj liberaj voĉdonaj proceduroj.

Artikolo 22

Ĉiu, kiel membro de la socio, havas

rajton je socia sekureco kaj povas postuli la realigon, per naciaj klopodoj kaj internacia kunlaboro, kaj konforme al la organizo kaj disponeblaj rimedoj de ĉiu Ŝtato, de tiuj ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, kiuj estas nepre necesaj por lia digno kaj por la libera disvolviĝo de lia personeco.

Artikolo 23

Ĉiu havas rajton je laboro, je libera elekto de sia okupo, je justaj kaj favoraj laborkondiĉoj kaj je protekto kontraŭ senlaboreco.

Ĉiu, sen ia ajn diskriminacio, rajtas ricevi egalan salajron pro egala laboro.

Ĉiu, kiu laboras, rajtas ricevi justan kaj favoran kompenson, kiu certigu por li mem kaj por lia familio ekziston konforman al homa digno, kaj kiun suplementu, laŭnecese, aliaj rimedoj de socia protekto.

Ĉiu rajtas formi kaj aliĝi sindikatojn por protekto de siaj interesoj.

Artikolo 24

Ĉiu havas rajton je ripozo kaj libertempo, inkluzive racian limigon de la laborhoroj kaj periodajn feriojn kun salajro.

Artikolo 25

Ĉiu havas rajton je vivnivelo adekvata por la sano kaj bonfarto de si mem kaj de sia familio, inkluzive

de nutraĵo, vestaĵoj, loĝejo kaj medicina prizorgo kaj necesaj sociaj servoj, kaj la rajton je sekureco en okazo de senlaboreco, malsano, malkapablo, vidvineco, maljuneco aŭ alia perdo de la vivrimedoj pro cirkonstancoj ekster sia povo.

Patrineco kaj infaneco rajtigas al specialaj prizorgoj kaj helpo. Ĉiuj infanoj, egale ĉu ili naskiĝis en aŭ ekster geedzeco, ricevu saman socian protekton.

Artikolo 26

Ĉiu havas rajton je edukigo. La edukado estu senpaga, almenaŭ en la elementa kaj fundamenta stadioj. La elementa edukado estu deviga. La teknika kaj porprofesia edukado estu ĝenerale akirebla, kaj pli alta edukado estu egale akirebla por ĉiuj laŭ ties meritoj.

Edukado celu la plenan disvolvon de la homa personeco kaj plifortigon de la respekto al la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj. Ĝi kreskigu komprenon, toleron kaj amikecon inter ĉiuj nacioj, rasaj aŭ religiaj grupoj, kaj antaŭenigu la agadon de Unuiĝintaj Nacioj por konservo de paco.

Gepatroj havas unuavican rajton elekti la specon de la edukado, kiun ricevu iliaj infanoj.

Artikolo 27

Ĉiu rajtas libere partopreni la kulturen vivon de la komunumo, ĝui la artojn kaj partopreni sciencan

progreson kaj ĝiajn fruktojn.

Ĉiu havas rajton je protekto de la moralaj kaj materialaj interesoj rezultantaj el eventualaj sciencaj, literaturaj aŭ artaj produktaĵoj, kiujn li aŭtoris.

Artikolo 28

Ĉiu havas rajton je socia kaj internacia organizo, en kiu la rajtoj kaj liberecoj difinitaj en ĉi tiu Deklaracio povas esti plene realigitaj.

Artikolo 29

Ĉiu havas devojn al la komunumo, en kiu, sole, estas ebla la libera kaj plena disvolviĝo de lia personeco.

En la uzado de siaj rajtoj kaj liberecoj, ĉiu estu subigita sole al tiuj limigoj, kiuj estas jure difinitaj ekskluzive kun la celo certigi adekvatan rekonon kaj respekton por la rajtoj kaj liberecoj de aliaj kaj por konformiĝi al justaj postuloj de moralo, publika ordo kaj ĝenerala bonfarto en demokrata socio.

Tiuj ĉi rajtoj kaj liberecoj estas en neniun okazo efektivegeblaj kontraŭe al la celoj kaj principoj de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 30

Nenio en ĉi tiu Deklaracio estu interpretita kiel implico, ke iu ajn Ŝtato, grupo aŭ persono iel ajn rajtas entrepreni ian ajn agadon aŭ plenumi ian ajn agon, kiu celus detrui kiun ajn el la rajtoj kaj liberecoj ĉi-ene difinitaj. □

REGINO

RAKONTO DE PASERĈJO



La kverka duflanka pordo disŝoviĝis antaŭ Ladislao kaj li venis en la tronĉambron. Ĝi estis granda ortangula spaco fermita per malhelbruna ligna plafono sur kiu estis skulptitaj kapoj kaj misteraj gobelinoj. La muroj estis rektaj kaj la ligna planko eleganta kun komplika desegno. En la vidalvida ekstremo de la ĉambro, inter du fenestroj, ĉe la fino de longa Persa tapiŝo kiu komenciĝis ĉe la pordo, staris granda skulptita trono, tiel ke la lumo de la fenestroj lasis ĝin en ombro.

Ĉe ambaŭ flankoj de la tapiŝo staris po vico de brile vestitaj paĝioj, gekorteganoj kaj altestimatoj. Ladislao irante al la trono, sentis centojn da malbonvolemaj okuloj rigardantaj lin kvazaŭ unikan beston kaptitan por amuzi la kapriceman Reĝinon. Sed li restis trankvila, jam de longe preĝinte al Maria kaj lia patrino Sankta Georgo. Li ankaŭ klopdis ne imagi la torturojn kiujn la kruela suverenino sendube por li pripensos.

Subite, unu el la halebardistoj de lia eskorto dolore pikis lian dorson

por genuigi lin, kaj tiun kvazaŭordonon li plenumis.

Ĉi tie, inter liaj patro kaj Danja, protektate de potenca halebardisto ĉe la maldekstra flanko, kaj maljuna ĉefepiskopo ĉe la dekstra, sur la granda malhela trono sidis ŝi. La Reĝino estis malgranda maldika virineto kun akraj sed subtilaj trajtoj de sombra vizaĝo, longaj rektaj haroj kaŝtanaj, kaj maldikaj manoj videblaj inter faldoj de vasta violblua robego kiu malpligrandigis ŝian aspekton eĉ pli. Oni apenaŭ povis kredi ke la koro de la granda kaj potenca ŝtato estas eĉ tiel eta.

Jam jarcenton daŭris sanga milito inter la du dinastioj, ambaŭ rajtantaj regi la montaran popolon. Katarina devenis de la aristokrata, laŭfakte reganta linio, kiu senespere defendadis sin kontraŭ kreskantaj hordoj da Ladisla-subuloj. Ŝi estis saĝa kaj lerta, sed malhumane kruela mastrino. Ekde la tragedia morto de la patro de Katarina, nur per sia fera mano kaj dia helpo ŝi malfruigadis neeviteblan venkiĝon fare de ŝia kavalira malamiko.

De la alteco de sia trono Katarina vidis la provokan rigardon de genuanta malliberulo maĉanta sian lipon. Li tiel malsamis inter la persaj gekorteganoj kiom hirundo inter vespertoj. Ladislao havis longajn malhele brunajn buklojn forfluantajn sur liajn bruston kaj dorson. Li estis vestita per malhele grizbruna loza bluzo kunprenita per nigra zono kun arĝentaj cirkloj. Sur

ĝi pendis malplena eleganta ingo. La bruston de Ladislao garnis peza arĝenta kruco, kiel simbolo de lia rekta kavalira koro. La grizaj sombraj okuloj kaj nobla frunto konvenis al stelplena montara ĉielo, sed ne al la korupta kortego.

Ho, kiel profunde malamamis ŝi siajn servantojn! Tiuj venialaj stultuloj, fieraj pro siaj oficialaj postenoj, mensogemaj kaj perfidemaj, zorgis nur pri kontentigado de siaj malsanaj ambicioj. Kun diabla plezuro ŝi do utiligis ĉian okazon por torturi ilin publike plej humilige. La babilantaj, fieraj ambiciuloj eĉ ne suspektis ke por ĉiu Katarina pripensis jam specon de ekzekuto, atendante nur la oportunun. Sed Ladislao estis malsama kiel suna radio en groto. "Li estas la sola savo por mi" pensis la Reĝino.

"Ĉu via princa moŝto estas preta por morto?" demandis Katarina per pripensitaj vortoj, kaj eksentis kiel sago alfluas en ŝia kapo.

"Ne estus mi kavaliro, se mi ne estus ĉiam preta" respondis Ladislao, kaj ekestis streĉita silento.

"La Providenco permesis al Ni kapti tiun kiu estas mortige malamika al Nia laŭleĝa regado. Ni do punos lin pro liaj krimoj, kiujn li mem bone konas. Ĉu li deziras pledi por si?"

"Mi? Pledi mi ne volas, ĉar mia batalado ne estas krimo, nur sincera kavalira milito kontraŭ pramalamikoj. Tamen via kapto de mi estis krima kaj nekavalira. Mi postulas do..." La sentoj de Ladislao, pro lia

malespero, komencis forflui, "ke kavalira honoro estu al mi redonita."

"Kiu honoro? Ni ne komprenas."

"Mia avo Nikolao la Granda kaptis vian avon Zenonon, samkiel viaj servantoj kaptis min. Princo Zenono provokis mian avon al duelo, per la duelo li venkis kaj estis liberigita." Ĉimomente Ladislao ekrigardis sian senesperoplenan amantinon kaj aldonis: "Se ne bonvolos via reĝina moŝto min liberigi, mi petegas do eblon batali por la graco de libero por mia maljuna patro kaj por la senkulpa damo estanta ja sub mia prizorgo."

Ne esperante pozitivan respondon, Ladislao ekrigardis en la okulojn reĝinajn per la fiero de morala alteco.

"Ho mia kavaliro," ekridetis Katarina, kaj ŝi turnis ŝiajn okulojn, "ĉu vi ne imagas vin esti en viaj arbaroj? Tiu ĉi estas reĝa ĉefkastelo kaj respondecas Ni ĉi tie pri la paco en nia regno. Neniam do povus Ni pardoni malamikon ĝin detruantan. Kaj ĉu vi," nun ŝi ririgardis ĝoje, "ĉu vi volas dueli kun Ni?!" Katarina levis sian maldikan braketon "per viaj amataj hakiloj?"

Ŝi serioziĝis: "Por la paco de nia regno ni devas vin mortigi, ĉiun el vi!" Katarina zorgis ne montri sian profundan malestimon je la amantino de la malliberulo.

La vizaĝo de Ladislao restis tamen trankvila. Li nur ridetis amare al siaj geamatoj.

Subite, la okuloj de la suverenino eklumis verde.

“Ladislaŭo, kuraĝa kavaliro, princo kun granda koro, por esprimi mian respekton al vi,” Katarina sin klinis, “mi estis preta savi vian vivon, same kiel la vivon de viaj amatoj, kun tamen unu kondiĉo.” Ŝiaj okuloj lumis pli kaj pli. “Se antaŭ la ĉefepiskopo, kiel reprezentanto de Jesuo, antaŭ viaj kavaliraj honoro kaj konscienco, antaŭ via patro Kazimiro, antaŭ mi kaj la tuta kortego, vi promesos doni al mi viajn tutajn koron, korpon, kaj spiriton,” ŝi entuziasmiĝis, “se vi promesos ĉiun vian penson kaj senton kaj vin tutan por mi, sekve mi savos vin, reciprokante vian respekton, respektante vian patron, kaj la milito finfine ĉesos.” La Reĝino eksilentis, senmove.

Ladislaŭo pensis iom por kompreni la neatenditan situacion kaj rigardis demande al la okuloj de Danja, trovante tie nur teruritan petegon por vivo.

“Jes, bone. Antaŭ la Mastro en Ĉielo, antaŭ ĉiu ĉi tie ĉeestanta, mi promesas al vi miajn amon kaj lojalecon, kun la kondiĉo de reciprokeco.”

“Amen!” diris la ĉefepiskopo, al kiu antaŭe estis sekrete konigita la plano de la Reĝino.

Katarina elspiris forte pro malpeziĝo, klinis sin por kisi antikvan, pezan kronon starantan sur tableto ĉe la trono, kaj desaltis de sia alta sidejo. Poste ŝi prenis de malantaŭ la trono kaj senvorte redonis al sia kavaliro lian elegantan sabron orientan.

Post anonco de ordonoj pri gastig-

ado de Kazimiro kaj Danja, Katarina, aspektante ege kontenta, gvidis Ladislaŭon tra sia palaco. Ladislaŭo estis tiel stuporigita de la lastaj eventoj ke li iris post ŝi kvazaŭ hundido. Ja li preĝis al Sanktaj Maria kaj Georgo, sed esperante nur dignan morton. La ŝanĝiĝoj, de venkanta princo, tra malliberulo atendanta ekzekuton, ĝis edzo de sia mortiga malamikino, estis por li nekredeblaj. Bone, ke almenaŭ Paĉjo kaj Danja ŝajnas esti savitaj. Ho! Kiel rapide marŝas la virineto!

Ili alvenis trian etaĝon de portikoj ĉirkaŭ la ortangula kastela korto. La vetero estis belega. Suna seka frosto aldonis viklecon kaj freŝecon al ĉio. Sur la ruĝaj tegoloj de la dekliva tagmento kuŝis dika kovraĵo de malnova neĝo, blindiga en la tagmeza suno.

Katarina turnis sin al la norda, romaneca parto de la kastelo, venis al fera pordeto kaj invitis tien Ladislaŭon. La ĉambro estis malvarma. Sur blankigitaj ŝtonoj de la muroj kaj volbo pendis kelkaj gobelinetoj kaj unu eta bildo de maldika sanktulino en monahinaj vestoj. Staris tie ĉi unu modesta ŝranketo, malgranda kameno, breto kun kelkaj libroj, simpla ligna lito, kaj skribtableto ĉe maldika romaneca fenestro kun krevinta vitro — tra kiu videblis neĝkovritaj urbaj tagmentoj, turoj, kaj malproksima abundo de ĉirkaŭurbaj montetoj kun blankaj bienoj kaj malhelaj abiaj arbaroj.

Katarina fermis la pordeton kaj

kun rideto turniĝis, ŝirmante ĝin per sia korpo. Poste ŝi kunmetis siajn manojn streĉitajn super la kapo kaj komencis turniĝadi de flanko al flanko, tiel ke ŝia vasta robo ekspiraladis.

Ladislao ekpensis ke jen, antaŭ liaj okuloj, dancas kiel knabineto la sanga malamiko de lia gento kaj senkonscie metis sian maldekstran manon sur la tenilon de sia sabro. La Reĝino haltis ekserioziĝinte kaj kovris lian manon per siaj malvarmaj fingretoj.

“*Verbum nobile,*” respondis li, kaj li ridetis senpove.

“Surgenuu!” ordonis Katarina. Kiam li tion plenumis, lia vizaĝo troviĝis rekte antaŭ ŝia. Ŝi ekridis kaj kaptante liajn buklojn, kisis lin sur la frunto.

Kiun fidi, se ne la malamikon?

RECENZONTO SERĈATA

Ni serĉas recenzonton por la ĉisekva libro:

Ne nur soldato Ŝvejk de Jaroslav Haŭek. 248p. Kolekto de humoraj nelongaj noveloj.

Se vi deziras recenzi la libron, bonvolu kontakti la redaktoron de *ESK*, kiu sendos (donace) al vi la libron.

EN EDINBURGA KAFEJO



RAKONTO DE
JENNIFER BISHOP

Mi unue renkontis Ĵodin en kafejo en la granda urbo Edinburgo. La kafejo homplenegis. Ĵodi sidis sola kaj manipulaĉis iun objekton sur tablo. Mi aliris ŝin. La objektoj estis paro de orelingoj kaj kolĉeneto. “Ĉu vi permesos ke mi sidu tie?” mi diris, montrante malplenan seĝon.

Ĵodi larĝokule rigardis min. Hezite ŝi diris: “Ĉu vi opinias ke estas permesite ke mi prenu ĉi tiujn objektojn? Kiam mi eniris la kafejon, estis maljuna virino sidanta ĉi tie, sed dum mi ĉirkaŭrigardis, ŝi evidente foriris. Kiam mi sidigis mi rimarkis ĉi tiujn objektojn sur la tablo. Mi deziras preni ilin por pruvi ke mi ja estis ĉi tie.”

“Probable vi devus doni ilin al kelnero. Eble la virino revenos por regajni ilin kiam ŝi konstatos ke ŝi lasis ilin ĉi tie.”

Ĵodi sidis silente, profunde pensante. Kviete ŝi diris: “Sed ĉi tiuj orelingoj estas Skotaj kardoj, kaj mi bezonas havi ilin por preni hejmen por pruvi al miaj amikoj ke mi ja estas en Edinburgo hodiaŭ.”

“Ĉu neniu el viaj amikoj scias ke

vi estas ĉi tie hodiaŭ?”

“Ne. Ĉi tiun matenon, kiam mi ellitiĝis, mi estis en Brisbano, Aŭstralio.”

“Sed la flugo de Aŭstralio al Edinburgo daŭras dum dudek horoj aŭ pli. Kiel vi alvenis tiel rapide?”

“Mi ne scias. Post matenmanĝo en Brisbano, mi trafis trajnon por iri butikumi. Kiam la trajno haltis, mi eliris, sed la centra stacidomo ŝajnis esti iel malsama. Nenio ŝajnis tute konata. Kie mi estis? Mi demandis al viro: ‘Kiu urbo estas ĉi tiu?’ Li montris grandegan indikilon, dirante: ‘Ĉu vi ne povas legi?’ Fiere li aldiris: ‘Ĉi tiu estas Edinburgo!’

“Mi decidis trovi kafejon kie mi povos pensi pri mia nuntempa stato. Mi rigardis en mian mansakon: En ĝi estas nur kvar cigaredoj, neniom da mono, neniun pasporto. Absolute nenio, krom kvar cigaredoj kaj lumigilo. Jam estis la dekoka horo.” Maltrankvile, ŝi aldiris: “Kie mi dormos, se mi ne havas monon?”

“Mi povas helpi vin. Mi scias kie estas ŝirmejo por senhejmaj geviroj. Mi vin gvidos tien.”

Mi rigardis Ĵodin dum ŝi metis la kardajn objektojn en sian mansakon, sed mi diris nenion.

Ĉe la ŝirmejo estis longa viclinio, almenaŭ tridek personoj. Ni staris silente. La aliaj homoj babiladis. Subite mi aŭdis dum Ĵodi diras al junulino: “Ĉu vi parolas Esperanton?” Ja ŝi havis Aŭstralian prononcmanneron, ne la Skotan! Ŝi ne povas

bone prononci r.

Hezite, Ĵodi aldiris: “Mi ne havas monon kaj mi ĉi tiun versperon amus resti en la hejmo de Esperantisto. Eble, morgaŭ, la ĝentila Esperantisto gvidos min por vidi Kapelon Rosslyn kiu estas nur dek naŭ kilometrojn for. Ĉu vi opinias ke tio eblas?”

Dum Ĵodi paroladis, mi ĉirkaŭrigardis por ekscii kiaj estis la aliaj senhejmuloj. Kiam mi rerigardis al kie staris Ĵodi, ŝi ne plu estis tie. Nenie mi povis vidi ŝin.

Mi ne sciis, ĝis post malmultaj tagoj ŝi skribis al mi leteron ke, je tiu preciza momento, Ĵodi estis en Brisbano, Aŭstralio. Ŝi vekigis memorante ke ŝi estis en Edinburgo, sed ke ŝi ne vidis Kapelon Rosslyn. Ŝi ellitiĝis kaj enrigardis sian mansakon. En ĝi estis la Skotaj kardoj kaj ŝia lumigilo; neniom da mono, neniom da cigaredoj, nek pasporto, nur la kardoj kaj ŝia propra lumigilo.

Kio okazis antaŭe? Unu vesperon, antaŭ ol ŝi enlitiĝis, ŝi legis pri libertempa turista vojaĝo al Eŭropo, Anglio kaj Edinburgo, kaj al Kapelo Rosslyn¹. Kiel ŝi deziris partopreni! Eĉ en 1998 estas grandega mistero

¹ La gazeto *Nexus* organizas trisemajnan voyagon al misteraj lokoj en Eŭropo, kiu okazos de la 22-a de Julio ĝis la 12-a de Aŭgusto 1999. Por la detaloj, skribu al Travelrite International, 182 Canterbury Road, Heathmont, Victoria 3135, Australia.

The Challenge of Interlingualism

A Research Invitation

by Jonathan Pool and Mark Fettes

Esperantic Studies Foundation

What is an interlingual world?

For millennia, the world has exhibited various combinations of linguistic homogeneity (unilingualism) and linguistic plurality (multilingualism). Peoples separated by barriers such as mountains and states have developed and used thousands of diverse languages, while social forces such as trade, religion, education, conquest, and colonization have spread the use of particular languages across continents and oceans.

The spread of intercommunal languages, while providing a solution to the problem of communal isolation, also creates problems of its own. Communal languages, in which diverse ideas and ways of life are cultivated, shrink and die in competition with intercommunal ones; the latter's native speakers enjoy unearned privileges; and widespread costs and inefficiencies are entailed by language learning, translation and duplication.

In its evolution between the opposing poles of many isolated language communities or a single world language, the global linguistic system could take many forms. Some of these potential forms might exhibit, at one and the same time, high levels of linguistic diversity, linguistic integration, linguistic equity and linguistic efficiency. We refer to any sustainable variant displaying such properties as an interlingual world.

Do we want an interlingual world?

Diversity, integration, equity, efficiency and sustainability are widely professed values today, for instance in relation to education, health, and telecommunications. Yet one is hard pressed to find a similar consensus in the field of language. We surmise that this is largely due to perceived conflicts among these values. For example, those who dislike linguistic diversity or oppose linguistic equality may do so because they fear greater costs (whether societal or personal) and less integration. Indeed, it seems likely that an interlingual world would embody a number of trade-offs between the five values, rather than maximizing any of them.

In this respect, however, language is no different from education, health, telecommunications, or any other complex system for the production, distribution, and use of social goods. We suspect that an interlingual world would be broadly consensual, if it were shown to be possible.

Is an interlingual world achievable?

Obviously, achieving an interlingual world would not be easy. How could the world be highly diverse in language, yet highly interactive, without great expenditures to achieve intercommunication? What would induce people alive today to accept the burden of change in their languages or language regimes if only future generations would benefit from such change? Why would those who invent and produce language-processing tools devote their efforts to serving any but the users of major languages? What would induce the beneficiaries of today's linguistic arrangements, most notably the native speakers and fluent learners of English, to support a transition that would neutralize their language-based privileges?

Whether an interlingual world is achievable, and if so how, is a principal research interest of the Esperantic Studies Foundation.

The possible answers to this question range from

- “The world is naturally becoming interlingual, and nothing can be done to stop it”

to

- “Nothing can be done to stop the world from becoming ever less interlingual”.

Any answer in this range might provide the basis for a research program on interlingualism, for instance by exploring the impact of current linguistic trends and processes on the range of potentially achievable worlds. Other, more action-oriented answers might take the form

- “The best (or only) way to make the world interlingual is to ...”.

Given the apparent value conflicts inherent in the notion of an interlingual world, we would be intrigued by any coherent description of what such a world would be like, how it would work, and how we might transform today's world into it.

Ideas of an interlingual world

We haven't found any such coherent descriptions yet, but at least some bodies of thought offer preliminary accounts, or inspirations for accounts, of an interlingual world (“interlingualism” for short). Outlined in schematic fashion, here are five variants of interlingualism that appear to have acquired a significant literature and a corps of advocates, researchers and practitioners:

World English (WE)

The most widespread second language of the present day, English, might make the world interlingual by becoming so well integrated in educational and social systems worldwide that it was accessible to all at minimal cost. One

variant of World English is unilingualism; however, if the world's majority were motivated to keep cultivating their autochthonous languages, and if any related economic or social costs could be compensated, English might become the world's "second native language", transcending but coexisting with a multiplicity of other languages.

Esperantism (E)

An invented language (not necessarily Esperanto itself), designed as a global auxiliary language in which fluency can be achieved at low cost, might make the world interlingual. If it became customary to use such a language for all translingual communication, the burden of linguistic accommodation would be both small and equal for all. If the language retained its auxiliary status, bilingualism would become a near-universal condition.

Language Brokers (LB)

Professional translators and interpreters might achieve an interlingual world by enabling people without a common language to communicate with success, despite greatly dissimilar experiences and beliefs. If appropriate conditions for such work became normative, and if translators and interpreters were efficient and numerous enough, they might make it possible for most people to cultivate their own languages and communicate interlingually without the burdens and risks of widespread language learning.

Plurilingualism (P)

A world in which knowing many languages is as normal as knowing many people might be an interlingual world. If breakthroughs in the methodology of language teaching could be verified and propagated, and if multilingual competence became widely valued, people who needed to communicate across language barriers would normally have or could easily develop the ability to do so.

Technologism (T)

Invention might resolve the apparent incompatibilities of interlingualism. If the intricacies of grammar, meaning, and communicative strategy could be understood and codified, language barriers might disappear altogether in the presence of fully automatic translation between the world's tongues, or be superseded by novel, automated, non- or panlingual means of communication.

Research on interlingualism: What next?

1. Extension: We have summarized five ideas of how an interlingual world might be achieved and sustained. What other promising ideas exist? How might the overall concept of interlingualism be further developed and applied?

2. Clarification: We want to see each idea developed in much greater detail than the preceding sketches. To what extent and in what senses would its implementation make the world linguistically diverse, integrated, equitable, efficient, and sustainable? Who would do what in order to transform the world from its status quo to the envisioned state? What would induce those people to take the required actions? How would the world's interlingualism be sustained once it is achieved? What forces tending to erode it would exist, and how would they be counteracted? What amounts and kinds of coercion or inducements would be required to achieve and to sustain an interlingual world?

3. Confrontation: How do the alternative ideas of an interlingual world interact? Are they mutually exclusive, compatible, or complementary? What do advocates of each idea assert about the others: impractical, infeasible, unnatural, unstable, unjust, out of synchrony with history? What defenses or refinements arise from those claims? Does each represent an imperfect approximation to an interlingual ideal, and, if so, to which values and interests does each give relative preference? Would one idea be more achievable but another more sustainable? Would it be reasonable to promote one idea at first, followed by a transition to another, or to promote more than one at once?

4. Confirmation: The assumptions underlying the ideas of an interlingual world can be empirically verified, refuted, modified, and quantified. What are the most critical tests for each idea--the tests whose results could make us reject the idea and avoid a need for additional testing on it? Should the ideas be tested in a particular sequence, and, if so, why? What is already known about the costs, rates, qualities, limits, and other relevant parameters? We wish to contribute new results that will allow us to evaluate the feasibility of an interlingual world and strategies for its implementation.

RSVP: If you are a scholar or applied researcher interested in the subject of interlingualism, the Esperantic Studies Foundation invites you to keep us informed of your activities and publications and welcomes your inquiries about proposed research, particularly research that responds to this statement of interests.

Send comments to Jonathan Pool or Mark Fettes.

Esperantic Studies, Number 10, Autumn 1998

From the Internet: <<http://magi.com/~mfettes/es.10./html>>

pri la konstruo de Kapelo Rosslyn dum la jaroj 1440-1480. Ve, la vojaĝo estis tro multekosta por ŝi.

Denove ŝi rigardis en sian mansakon. Ŝi elŝutis la enhavon sur la kuirejan tablon. Ja estis la kardoj. Ŝi ne komprenis tion kio okazis. Certe ŝi ne estis vidinta Kapelon Rosslyn, sed ŝi ja vidis la Edinburgan stacidomon kaj la internaĵon de Edinburga kafejo.

Zorge, pense, danke kaj respektoge, ŝi metis la kolĉeneton ĉirkaŭ sian kolon.

“Tiel proksime, tamen tiel malproksime,” ŝi murmuris, ame tuŝante, denove, la Skotajn kardojn. □

SAT ANONCAS: EBLE PIV EN 2000

Miguel Duc Goninan informis ke reviziado de *Plena Ilustrita Vortaro* bone evoluas: ĝi estos eldonita de SAT eble jam en 2000, tute renovigita, ĝisdatita kaj vere ilustrita, nome la bildoj estos enkorpigitaĵoj en la teksto mem.

La tre altaj eldonkostoj devigis la Plenumkomitaton de SAT malfermi fonduson. Ĉiu Esperantisto povas kontribui al la eldono per mondonaco.

Laŭ *Heroldo de Esperanto* □



ESPERANTO POST LA JARO 2000

RECENZAS
DONALD BROADRIBB



Aleksander Korĵenkov: *Esperanto post la jaro 2000*. Rotterdam: UEA, 1998. 18p., broŝ. Prezo: NGld 4,80.

Elstara broŝureto, kiu klare kaj sentime prezentas ne tre bongustajn faktojn:

...la esperantista ideologio fine de la 20a jarcento front[aj]s alternativon:

– plu bazi sin sur la pasintjarcenta koncepto pri plurlingveco kiel la ĉefa trajto de la monda lingvoproblemo, kaj pri Esperanto kiel la helplingvo por la malsamlingvaj teranoj; [aŭ]

– reale konsideri la internacian lingvokomunikadon kaj rezervi por Esperanto pli adekvatan rolon...


Oni ne povas serioze kontraŭstarigi Esperanton al la angla en ties helplingva rolo. Kaj tio ne estas necesa...

Esperanto post la jaro 2000 povos havi lokon:

• se plejmultaj esperantistoj konsciigos pri la realaj valoroj de Esperanto...

- se la esperantista komunumo identiĝos kun la ideoj de homaj rajtoj...en kiu ĉiu specio, kulturo kaj lingvo rajtas ekzisti kaj evolui;

- se gvidantoj...komprenos la neceson de toleremo kaj kunlaboro ne nur en la granda mondo, sed ankaŭ en nia negranda parolkomunumo. □



Josef Kavka: *Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature*. Dobřichovice (Ĉeĥio): KAVA-PECH, 1996. 32p., broŝ.

La subtitolo informas pri la celo de la verko: "Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature".


Homonimoj estas vortoj kiuj estas sammaniere literumitaj sed havas malsamajn signifojn. Pli simple: vortoj kun pli ol unu signifo. Kavka konsideras nur unu specon de homonimoj, nome vortojn kiuj aspektas kvazaŭ temas pri radiko plus afikso, kvankam efektive ili estas tute kompletaj vortoj. Ekzemple:

soneto (speco de poemo), kiu aspektas kvazaŭ farita el *son-et-o*, *kinino* (medikamento) kaj *kin-in-o*, *avida* kaj *av-id-a*. Efektive, en Esperanto plurcent tiaj terminoj ekzistas en la Fundamento kaj la Oficialaj Aldonoj.

Kontraste, Zamenhof ŝanĝis vokalon en centoj da aliaj vortoj, ŝajne por eviti homonimecon: *gelateno* anstataŭ *gelatino*, *orakolo* anstataŭ *orakulo*, *planedo* anstataŭ *plan-et-o*. La rezulto estas iom kaosa. Kiam temas pri nomoj de bestoj kaj plantoj, la nomoj estas galimatio da nekongruaj formoj.

Kavka pledas ke ni ne timu homonimojn, kaj almenaŭ por sciencaj nomoj en faka uzado ni ne tordu la literumadon. Li donas detalajn listojn da ekzemploj.

Verko rekomendata por fakuloj kaj Esperantologoj.



Petr Chrdle (redaktoro): *La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto*. Dobřichovice (Ĉeĥio): KAVA-PECH, 1995. 191p., broŝ.

Libro vere valora por Esperanto-

logoj. 35-paĝa artikolo de André Albault: "La du ĉefaj grafemo-fonemikaj zonoj *aŭ* Kiel prononci fremdajn nomojn en Esperanto-tekstoj" estas tre detala analizo pri la sorto de la Latina alfabeto en la diversaj Eŭropaj lingvoj kaj la sonoj akiritaj de la Latinaj literoj en tiuj lingvoj.

Malpli longaj artikoloj ankaŭ tre studindaj estas:

Michel Duc Goninaz: "Pri la reguleco de Esperanto" (en kiu li diskutas pluraj *ne*-regulaĵojn en la Fundamenta formo de la lingvo,

Christer Kiselman: "Transitivaj kaj netransitivaj verboj en Esperanto" (en kiu li diskutas la nekoheron de la distribuado de transitiveco aŭ netransitiveco al diversaj verboj,,

Detlev Blanke: "La 'Enciklopedia Vortaro' de Eugen Wüster", detaloj pri tiu neniam plene eldonita verkigo tre grava por vortaristoj;

Krome tre menciindas Ian Jackson: "Fakaj terminoj de ĉiutaga lingvo"; Judith Jackson: "Bestoj en la teksonomia ĝangalo—Zoologia terminkreado" Marie Bartovská: "Teksumo kaj Esperanto"; Wim. M.A. de Smet: "Nuna stato kaj perspektivoj de Nova biologia nomenklatur".

Jean Thierry: "Raymond Schwartz...la vortĵonglisto", Werner Bornmann: "Defio faklingvo", Rüdiger Eichholz: "Principoj por selekto de fakaj terminoj", Alicja U. Krejčić-Lewandérska: "Sociaj taskoj de...Esperanto en edukado kaj instruado", kaj aliaj. □



TERMINOLOGIA GUIDILO

NOTAS
DONALD BROADRIBB



Heidi Suonuuti: *Terminologia gvidilo*. Tr. Sabine Fiedler, red. Wera Blanke. Rotterdam: UEA, 1998. 38p. broŝ. Prezo: 12 NGld 4,80.

Manlibro pri praktikaj principoj de la kompilado de fakaj terminoj, kun ekzemploj. Utila kaj rekomendinda al personoj entreprenantaj tian taskon. □

LAŬ LA INTERRETO

Ekzistas Esperanto-"klubo" ĉe

<http://clubs.yahoo.com/clubs/esperanto>

Per ĝi oni povas afiŝi mesaĝojn, babilo, anonci paĝojn. Ĝi estas vizitinda minimume unufoje, kaj se pli da homoj "membriĝos", ĝi iĝos des pli vizitinda.

Komencantoj estas bonvenaj.

Christopher M. A. Zervic
Prezidanto,
Esperanto-Societo de Ĉikago



PLUA RAPORTO EL LITOVIO

de TREVOR STEELE

Post la UK en Montopellier mi gvidis unumonatan Esperanto-kurson en la marborda urbo Palanga. Estis laŭ Litovaj kriterioj nur du malgrandaj klasoj (po dek) — sed dudek lernantoj estus motivo por ĉampan-festo ĉe ni en Aŭstralio, ĉu ne?

Mi translokiĝis al la ĉefurbo Vilnius por instrui dum tri monatoj. La unuan tagon mi devis alfronti ...220 komencantojn! Oni persvadis 60-70 el ili atendi novan serion de klasoj en novembro aŭ decembro. Tamen la kvar klasoj, al kiuj mi instruas ĉiutage por 90 minutoj, restas tre grandaj. Kaj plejparte temas pri homoj 15- ĝis 30-jaraj.

En Kaunas kaj Palanga miaj lernantoj ĉiuj parolas Litove. Kvankam laŭ principo kaj pro neceso mi parolas nur Esperante, foje mi volas kontroli ĉu la aŭskultantoj vere komprenis iun vorton/esprimon. La signalo estas ke mi aŭskultgeste tenas la orejon kaj ĉuas: "Litove?" En Vilnius la Litovlingvuloj estas apenaŭ duono de miaj lernantoj. Pro la fluo de la historio estas multaj Slavoj ĉi tie. Nun mi gestas: "Litove?", "Ru-


se?", "Pole?"

Eĉ pli interesa, kaj potencie signifoplena, estas mia instruado en Visagina, en angulo de Litovio ĉe la limoj kun Latvio kaj Belorusio. Mi klarigu: nur ok kilometrojn de Visagina estas la plej granda nuklea reaktoro de la mondo (persone, mi ŝatus fermi ĉiun nuklean reaktoron, sed ne pri tio temas ĉi-momente!). Dum la tempo de Sovetia Unio estis nomada elito, preskaŭ plene Rusdevena, kiu laboris scienciste/teĥnikiste ĉe nukleaj reaktoroj kaj aliaj energigeneroj en Kazahio, Ukrainio, Rusio, Litovio, ktp. Kiam Soveta Unio malaperis, tiuj homoj devis decidi ĉu reiri al Rusio, la kultura patrio, aŭ resti tie kie ili havas postenojn.

La loĝantaro de Visaginas estas grandparte Ruslingva. Kvankam civitanoj de Litovio, ili nur escepte parolas la lingvon de la lando. Antaŭ kvar jaroj oni fondis en la urbo filion de la Moskva Universitato (estas nun nova filio en Vilnius. Se juĝi laŭ miaj spertoj, mi supozas ke la kursoj tie estas je alta intelekta nivelo, sed pro lingvaj problemoj la Litova ŝtato ne agnoskas la diplomojn. Serĉante apogon aliloke, la tre simpatia direktoro de la Universitato (mem Rusparolanta sed aŭtenta Litovo) establis kontakton kun AIS (La Akademio Internacia de Sciencoj) kies sidejo estas en la nana respubliko San Marino. AIS estas fakte kreaĵo de Esperantistoj-profesoroj diversnaciaj. Ĝis nun ĝi ŝajnis al mi

organismo kun kapo (pompaj profesoroj titoloj, instruplanoj, ktp) sed sen la cetera korpo (t.e. studentoj). Mi tre esperas ke tiu ĉi nova evoluo profitos al la Rusoj de Litovio kaj ankaŭ aldonos korpon al AIS. Ĉiukaze, oni dungis min por doni intensajn semajnfinajn Esperanto-kurojn. Mi ridetas pri la eminentula traktado: mi loĝas en luksa hotelo (sendube iam rezervita por altaj partianoj) kaj manĝas en aparta ĉambro en la plej bona restoracio. Kaj la kontakto kun tiuj inteligentaj kaj ambiciaj studentoj estas tre agrabla: post nur ok lecionoj ili komprenas nekredible multon. Temas pri du klasoj kun po dudek studentoj.

Ĉiumatene mi bezonas horojn por prepari kaj fotokopii la kursmaterialon, ĉar ne ekzistas preta materialo taŭga por esti bazo de mia metodo, kiu postulas multe da aktorado kaj konversacio inter mi kaj lernantoj, kaj inter lernantoj mem. Ĉar mi instruas ok lecionojn sep tagojn semajne, mi estas foje laca. Sed estas privilegio por instruisto de Esperanto povi labori en ĉi tiu landeto, potenciale la Mekko de nia movado. □



Teksto de afiŝo en la Heidelberg Restaurant en Berkeley Kalifornio:

This restroom is for use of our only customer.

[El EsperantoUSA] □



SKRIBAS

LA LEGANTOJ





SKRIBIS PAUL DESAILLY:

It would be very handy if you could post to me a small presentation in English that details the history and objectives of Esperanto and the Internal Idea. I have started a new course this semester and all my students are English majors.¹

It's hard to describe the joy of the local and active Esperantists when they see mention of their home town in the magazine of another country. (Unfortunately I have not received my own copy of ESK nor did I receive July/August.)² I understand that it was an initiative of the Melbourne


Esperanto Society to send ESK to Tianjin because of the twin city status. It would surely be wonderful local and international P.R. if all Australian Esperanto clubs could arrange a similar donation to their respective twin cities.

¹ Ĉu iu(j) el la legantoj bonvolos plenumi ĉi tiun peton? — 

² Ĉar ni regule sendas ESK-on al la adreso de Paul Desailly, pri la perdiĝo de tiuj numeroj ŝajne respondecas la Ĉina Poŝto. — 

Two weeks ago we had the Tianjin Esperanto Association's Annual General Meeting attended by about 50 Esperantists and the local TV. It was fully catered for 24 hours and included a high standard of entertainment and speech making. A Polish Australian Esperantist, Amelia, from the Aulsebrooks' neck of the woods (is it Forster?) in N.S.W. coincidentally arrived in Beijing on the same day. An Esperantist from Changchun, Mr. Wei, picked her up in his car and looked after everything. She even made a little speech at our A.G.M. and enjoyed the Chinese banquet. Changchun Esperanto Club is very active on the Net and in education. While there I visited the palace of the last emperor, PuYi, set up by the Japanese military Manchurian Puppet Government.

Paul Desaily
Tianjin University of Commerce
East Entrance Jinba Road
Beichen District
300400 Tianjin
P.R. Ĉinio



SKRIBIS ISTVÁN MÉSZÁROS:

En la lasta numero de *Esperanto sub sub la Suda Kruco* en "Lingva angulo" de Alan Towsey mi legis ion kio frapis miajn okulojn.

Ĉu transitiva aŭ ne?

Ofta demando kiu kaŭzas multajn kapdolorojn por tiuj kiuj ne havas en sia gepatra lingvo transitivajn verbojn.

Unue oni devas apartigi transitivecon de tiuj kazoj kie oni uzas -n finaĵon pro aliaj kialoj:

- montri direkton ĉe prepozicioj aŭ adverboj kiuj signas lokon: *en, sur, sub, trans; hejme, tie, supre.*

- signo de tempodaŭro, mezuro kaj dato: *Mi restas tri tagojn. Mi promenas tri kilometrojn. La revolucio komenciĝis la 15-an de marto 1848.*

- kelkaj esceptaj kazoj: *saluton, dankon, bonan apetiton* k.s. Sed se ni aldonas tion kion ni subkomprenas: *Mi deziras bonan tagon, bonan apetiton, feliĉan feston, mi petas pardonon, akceptu dankon*, ili fariĝas ne esceptaj.

- forlaso de origina prepozicio: *Mi iras sur monton — mi iras monton.* Pri tiu formo mi havas mian propran opinion: Mi lernis la lingvon el libroj, en la unuaj dek jaroj mi aŭdis esperantan parolon nur en radio (tiutempe estis ĉiutaga kvaronhora radioelsendo en Budapeŝta radio). Esperantajn tekstojn mi legis el libroj kiujn oni kontrolis sufiĉe zorge kaj legis revuon *Hungara Vivo*, kies lingva revizianto estis Kolomano

Kalocsay. Do tian frazon kiel “*Mi iras monton*” oni malofte renkontas en bonkvalita literaturo. Kion oni pensu pri tia frazo ke “*Mi instruas vin Esperanton*”?

Mi komencis ekzameni verbojn — kiom diferencas transitiva de netransitiva. Eble mi ne pravus, sed mi vidas la diferencon en tio ke la netransitiva estas memstara verbo kaj la transitiva ne. La transitiva verbo ĉiam bezonas aldonan “objekton”. Ni komencu per verboj menciitaj en n-ro 36 de *ESK*:

Estas menciitaj du similaj vortoj: boli kaj fandi. La signifo de netransitiva *boli* estas varmiĝo ĝis svarma formiĝo de vaporbobeloj. *Fandi*: likvigi per varmo solidan substancon. Dum en la unua kazo la verbo agas mem, en la dua la agado estas sekvo de ekstera ago.

Servi: La verbo havas du signifojn: 1. havi postenon, 2. porti manĝaĵon. Kvankam *PIV* rekonas nur la unuan signifon, oni uzas la verbon ankaŭ por la dua senco, kie ĝi estas transitiva: *La lakeo sevas ĉe grafoj ekde sia infanaĝo, li servas la ĉiutage matenmanĝon je la 9-a*. En la dua signifo estas bezonata alia vorto (objekto) por koni precize la signifon de la verbo, sen tio ni ne scias pri kio temas.

Fumi: verbo kun du signifoj: 1. ellasi fumon (ntr), 2. Enspiri fumon (tr). En la unua kazo oni devas nur lasi (lignopeco) fumi, en la dua oni devas agi (eltiri, suĉi) por produkti fumon.

Grimpi estas netransitiva. Ĉe ĝusta uzo de vorto oni *grimpas sur arbon* (kie la -n finaĵo estas ne akuzativo sed servas por signi direkton). La verbo estas memstara, ĉar se ni forlasas arbon, la senco de la verbo ne ŝanĝiĝas.

Komenci: fari la unuan parton de afero aŭ de ago. “*La instruisto komencis la lecionon*.” “*La leciono komencis*” ... kion komencis la leciono? La dua frazo tiel ne havas sencon, io mankas el ĝi. Same “*la akvo bolis*” kaj “*ŝi bolis la akvon*”: en la dua estas bezonata aparta ago: varmigo.

Kelkaj hazarde elektitaj transitivaj verboj:

dungi: akcepti iun por laborposteno (objekto: iu)

gardi: zorgi pri sekureco de iu/io (objekto: iu/io)

kalandri: glatigi tolaĵon, paperon inter cilindroj (objekto: tolaĵo)

kontroli: esplori ĉu io estas tia kia ĝi devas esti (objekto: io)

ordoni: estre esprimi al iu sian volon ke li faru ion (objekto: io)

ornami: plibeligi ion per aĵoj (objekto: io)

teni: havi ion en mano (objekto: io)

La ekzemplo en la artikolo pri nebezono de akuzativo estas ne ĝusta, ĉar tie la akuzativon montras la loko de substantivo kaj ne iu certa aparta gramatika parto. La ekzemplo estus konvinka, se “the teacher began the lesson at 10 o'clock” kaj “the lesson began the teacher at 10 o'clock” estus egalvaloraj frazoj.

Mi esperas ke mia klarigo pri la



Deziras Korespondi




Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. La originalaj leteroj de la ĉisube listigitaj personoj estas haveblaj ĉe tiu adreso.

Se vi deziras aperigi korespondpeton en ĉi tiu rubriko, bonvolu kontakti Betty Aulsebrook.

/ GREGORO RICHERT, ul Kwiatowa 21, PL-84-242 Luzino, Pollando. Loĝas apud Gdansko. (SOLIDAREC-ano, interesiĝas pri kutimoj de Aŭstralio, literaturo, lingvoj, muziko, psikologio, vojaĝado.

/ KHEROVA MOHAMED, Chez Manfok Brahim, Rue chibam amas Ghazaouet, Hemcen, Alĝerio 13400. □



El broŝureto reklamanta la urbon Ankara en Turkio:

Visit our restaurant, where you can eat Middle East foods in a European Ambulance.

[El *EsperantoUSA*]



DONALD BROADRIBB LINGVA ANGULO



GRUNDO/TERO/AGRO

Kelfoje oni demandas pri la diferenco inter la vortoj *grundo* kaj *tero*.

Principe ili estas preskaŭ sinonimoj, kaj plejparte ilia uzo similas al la Anglalingva uzo de la vortoj *earth* kaj *ground*. Ĉefa diferenco inter la du vortoj estas ke *Tero* ankaŭ estas la nomo de nia planedo, do povas esti propra nomo.

TERO

Ĝenerale, la vorto *tero* havas du ĉefajn signifojn. Unue, ĝi signifas la tutan nian planedon:

Super la tero sin trovas aero.
(EKZERCO 26)¹

ĉi tie kuŝas la plej granda kantisto de la tero²
mi ankaŭ sur la tero lokon okupas²

En la komenco Dio kreis la ĉielon kaj la teron²
li difinis la fundamentojn de la tero²

¹ La EKZERCARO estas unu parto de la verko *Fundamento de Esperanto*.

se la ĉielo falus al la tero, birdokaptado estus facila afero¹

Kaj due, nur la solidan, firman supraĵon (dry land) de nia planedo:

Sur la tero kuŝas ŝtono. (EKZERCO 6)

[li] levas la leteron de la tero kaj legas^z

li furioze piedbatas la teron^z

kreskigu la tero verdaĵon, herbon^z

pluvo en Aprilo — por la tero utilo^z

el sama tero devenas, saman sukon entenas^z

ĝis vi revenos en la teron, el kiu vi estis prenita^z

la kantisto de Iliado fariĝis tero en la tero^{z2}

kiel longe homo kuŝas en la tero, antaŭ ol li tute forputriĝas^z

ĉi tie kuŝas, fariĝinte denove tero, iu^z

kaj Dio nomis la sekaĵon tero, kaj la kolektiĝojn de la akvo li nomis maroj^z

laŭdu la maron, sed restu sur tero^z

la vento pelis ilin al la tero^z

la boato tiel leviĝas, ke de la tero oni povas vidi la kilon^z

atendi sur tero, ĝis sekigi la rivero^z

fajro kaj aero kaj ter' kaj akvo

Kroma uzo temas pri pli-malpli vasta, limigita parto de tiu. Ofte ĝi temas pri specifa parto de la tero:

Josef aĉetis la tutan Egiptan teron por Faraono^z

el via idearo mi donos ĉi tiun teron^z

mi salutas vin, ho tero patrolanda^z

la loko, sur kiu vi staras, estas sankta tero^z

GRUNDO

Preskaŭsinonimo estas la vorto GRUNDO, oficialigita per la Unua Oficiala Aldono al la Fundamento de Esperanto. *Plena Ilustrita Vortaro* atentigas pri pluraj ĉefuzoj:

1. Tero, rigardata en rilato kun la kreskado de vegetaĵoj.

2. Tero, rigardata kiel bazo por konstruo, por starigo de io ktp.

la grundo, sur kiu kuŝas Amsterdamo^z

nia ĉefa zorgo..., ke ni havu sub niaj piedoj firman grundon

tio estas grundo kvazaŭ kreita por dancado, plata kiel telero^z

en la malseka argila grundo oni povis vidi la postesignojn de la piedoj de la anasoj^z

3. Tera supraĵo, natura aŭ pretigita, sub tavolo da akvo (kanalo, rivero, maro)

ŝtonkovrita grundo de kluzo

¹ Ĉi tiuj kaj la aliaj ekzemploj estas ĉerpitaj el *Plena Ilustrita Vortaro*. ^z = frazo skribita de Zamenhof.

² Tiel! (laŭ PIV).

Tamen, kelkrilate *grundo* havas propran uzon ne aplikeblan al *tero*:

4. Stato de la organismo, rilate al ties rezisto kontraŭ infekto, operacio ktp (PIV)

5. = fono
 pentraĵoj sur ora grundo^z

AGRO

Iom parenca estas la neoficiala vorto *agro*, uzita jam de Zamenhof. *Plena Ilustrita Vortaro* difinas *agro* tiel: Kulturata kampo.

Agro ĉefe utilas por pli grandaj vortoj: *agrar*^z, *agrara*, *agrokulturo*. □

INFANDESEGNAĴOJ
 KIEL
 INTERKULTURA
 LIGILO
 de KATALIN SMIDÉLIUSZA

Antaŭ unu jaro esperantista studentino de la Pedagogia Altlernejo¹ en Szombathely [Hungario] ekhavis ideon kolekti infandeseгнаĵojn el la tuta mondo kaj analizi ilin el psikologia vidpunkto. La temo estis

¹ T.e., laŭ Aŭstralia terminologio, kolegio, universitatnivela fakinstruejo.
 — DR

akceptita por diplomalaborado kaj ni komencis dissendi alvokojn. Helpe de Esperanto sendiĝis pli ol 500 desegnaĵoj el 14 landoj.

Katalin Borsos, la studentino, komence de novembro organizis ekspozicion el la 90 plej interesaj verkoj. La malfermon (kiu okazis dum la kutima Esperanto-klubkunveno) ĉeestis pluraj ne-Esperantistaj instruistoj kaj studentoj de la Altlernejo kaj ankaŭ eksterlanda Esperantista gasto Bengt Nordlöf el Svedio, pro kies ĉeesto estis tute nature uzi ankaŭ la internacian lingvon kaj tiel interpreti la inaŭgurajn paroladojn de artisto, katedestro, tiun de la studentino kaj Katalin Smidéliusz. La ĉeestantaj ne-Esperantistoj kun admiro sekvis la interpretantan studentinon Monika Molnar, kaj post ĉiu ero de la tre avangarda malferm-parolado de artisto la publiko spir-retene atendis, ĉu eblas traduki al la “artefarita” lingvo tiujn senfinajn, eĉ nacilingve apenaŭ kompreneblajn “pens-ondojn”. La tradukisto kaj la lingvo bone sukcesis.

La katedestrino esprimis sian deziron havi ankaŭ Esperanton inter la lingvoj (Angla, Germana kaj Itala) de la fako, en kiu oni trejnas lingvoinstruistojn por la unuaj kvar klasoj de la elementaj lernejoj. Laŭ ŝi la internacia lingvo estus multe pli facile alproprigebla por la infanoj kaj detruus la lingvajn barojn inter la nacioj, kiel faris tion la senditaj desegnaĵoj. Kia malkovro! □

EN MELBURNO



La Pontlingvistikistoj Pensadas sur la Ponto:

Kam Lee, Margarita Pavlova, Franciska Toubale, Kep Enderby, Stan Bruton,
Carol Lutz, Alan Bishop, Marcel Leereveld, Jenny Bishop, Mernie Heinz,
Ken Rolls.

Esperanto-Simpozio, 14 junio 1998, Woodlands Park, Essendon, Vic.



EL LA REGIONOJ

NSW: Ralph Harry, la 21an de oktobro 1998, prelegis al la Blavatsky Lodge de la Teozofia Societo en Sidnejo pri "Esperanto, The Language Which Helps Unite The People Of The World".

LA AŬSTRALIA KAJ LA NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

- La Aŭstralia Esperanto-Asocio:**
Prezidanto: Ron Gates, Wangarang, MSF 2001, Armidale NSW 2350. ☎ (02) 6772 3856
Sekretario: Neil Sills, 9 Ballantyne Street, Thebarton SA 5031.
Vicsekretario: Hazel Green, 44 Toowoomba Road, Oakey Qld 4401. ☎ (07) 4691 1238 E-poŝto: <hazgreen@tmba.design.net.au>
Kasisto: Margaret Inglis, 4 Mayfield Drive, Mt Waverley Vic 3149. ☎ (03) 9807 8589.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:

- Prezidanto:** David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 09-270 3669.
Sekretario: Brad McDonald, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035. ☎ kaj faksoj: 09-579 4767. e-poŝto: Bradley McDonald <neelam@voya ger. co.nz>.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

KOTIZOJ:

Aŭstralia Esperanto-Asocio:
 AŬD \$30 por individuo aŭ klubo (+\$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); \$20 por studento aŭ pensiulo; asocia membreco: \$10. Bonvolu

sendi vian kotizon al Libroservo de AEA, PO Box 230, Matraville NSW 2036.

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
 NZ\$40 por individuo, \$50 por geedza paro, \$10 por studento aŭ junulo (<20-jara). Klubo: \$1 por ĉiu ano. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto: Jackie Fox, PO Box 8140, Symonds St, Auckland 1035.

Unuopaj ekzempleroj de *Esperanto sub la Suda Kruco*: Por membroj, AŬ\$3 + poŝtsendkosto; por nemembroj, \$4.25 + poŝtsendkosto. Mendu de la Libroservo de AEA.

Abonoj ekster Aŭstralazio: En Usono kaj Kanado: US\$26. Mendu ĉe ELNA. Aliaj landoj: 50 Ned. Gld., pagu al la konto aeal-w de la Libroservo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio ĉe UEA.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1999 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1999 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita.

Ĉi tiu numero de ESK estas kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb per Power Macintosh 7200, la programo uzita estas Nisus Writer. Alfabetostiloj uzitaj estas New Century Schoolbook 10 kaj Verdana 16. La reteldono estas preparata per Macintosh IIcx, per BBE-dit, rtftohtml-mac, GraphicConverter kaj Netscape 2.0.2.